



monda solidareco

N-ro 114 - Aŭgusto 2015 - kvaronjara - 1.25 €

Prinutra sekureco "Nutromilito" Civitanaj agadoj

Monda Solidareco kontraŭ la Malsato celas interalie « *interveni por antaŭgardo, pligrandigo kaj racia utiligo de la nutraĵaj riĉfontoj de la homaro* », alimaniere dirite : zorgi por prinutra sekureco.

Tiu prinutra sekureco - la aliro al la nutraĵo estas fundamenta homa rajto - ne estas reale certigata por ĉiuj loĝantaroj tra la mondo. Eĉ ĝi estas serioze minacita. La postulo forte progresas : la monda loĝantaro kreskas, kaj samtempe la postulo de nutraĵo pli abunda kaj pli diversa por ĉiu implicas, ke oni produkti pli multe. Nu la agrikultura produktado estas trafita de la klimataj ŝanĝoj : la pluvoj fariĝis neregulaj en la tropikaj regionoj, kie vivas la plej malriĉaj ; la dezertiĝo plivastiĝas, la ĉemaraj grundoj tendencas malaperi.

La mekanikigo kaj intensiva produktado, kun aldono de kemiaj produktoj, ebligis pligrandigi la volumon de nutraĵoj, sed depost la ĉefkonferenco de 1992 en Rio kaj la koncepto de daŭriva evoluigo, postulo por ekologia respekto, perturbas, pli malpli laŭ la regionoj, industriigon kaj agrikulturon.

Al tiuj konstatoj aldoniĝas la elkampara migrado : la kamparanoj kun penigaj labor- kaj vivkondiĉoj estas allogataj de la urboj, kie ofte ekzisto estas ankoraŭ pli necerta. Malmultiĝas la etaj produktistoj de vivtenaj kultivoj, la legomkultivistoj, la homoj, kiuj vivigas grundon.

Ĉio ĉi ve ne kondukas al frateca solidareco antaŭ la alirebleco al nutraĵo, sed male al egoismo, al konfliktoj, al akaparado de terenoj, al senarbarigo.

Ŝtatoj aĉetas aŭ luprenas fekundajn terenojn por anticipi la antaŭviditan mankon de nutraĵo ; aliaj kultivas en malriĉaj landoj bestnutraĵojn, aŭ biobruilaĵojn, elpelante el siaj vivspacoj la indiĝenajn popolojn tiel senhavigitajn je la terenoj, kiuj vivtenigis ilin. Ĉio sen paroli pri la komercaj merkatoj, la spekulaciaj vetoj, kiuj privilegias la financon sen iu ajn respekto al homo. Tiuj malfacilaĵoj por aliri al nutraĵo naskas nesekurecon, socian kaj ekonomian nestabilecon.

Kaj tamen ! MSM ĉiam diras, ke « *la planedo kapablas nutri la tutan mondan loĝantaron, malsato ne estas fato !* »

Rezervoj de fekundaj terenoj ekzistas en Afriko, en Sud-Ameriko, en Azio ... asocioj laboras kune kun malgravaj produktistoj por antaŭenpuŝi sanan kaj racian agrikulturon, refekundigon de kelkaj grundoj, la rearbarigon, ... inĝenieroj laboras por reakordigi agronomion kaj ekologion, ... civitanoj grupiĝas por rehavigi al si siajn terenojn,

por la rajto elekti siajn semojn : la kamparanoj de la movado Ekta Parishad en Hindio, la Bunong de Mondolkiri en Kamboĝo (eksproprietigo de la terenoj por planti kaŭĉukarbojn profite al financista grupo), la Amazoniaj indianoj, ...


Ĉie tra la mondo viroj, inoj indignas, protestas kaj reelektas siajn vivmanierojn. Foje per amasmediaj agadoj kiel tiuj ĵus nomitaj, foje senbrue, modeste sed ĉiam en plena civitana konscio kaj remetante homan centren de la decidoj. Tie situas MSM silente kontribuante en la antaŭgardo kaj disvolvado de agrikultura proksimeca produktado per la financado de malgravaj projektoj adaptitaj al la kamparanoj, ĉar proponitaj kaj ellaboritaj de ili mem kaj harmonie kun la lokaj kondiĉoj. MSM estas ankaŭ konstante kun tiuj, kiuj provas gardi mondon eltenebla, home eltenebla.



Kuirado en la prinutra centro de Mboko (Kongio)

Enhavo

Prinutra sekureco kaj civitana agado	p. 1
Akapano de la terenoj	p. 2-3
Daŭrivaj Evoluigaj Celoj	p. 4-5
La vojoj de la solidareco	p. 6
El la Administra Konsilantaro	p. 7
Alvoko al bonvolemluloj	p. 8
Kolofono	p. 8



Akaparado de la terenoj ankoraŭ kaj ankoraŭ aktuala

Gravaj plurlandaj firmaoj, ŝtatoj, riĉeguloj plu akaparas la fekundajn terenojn, kiuj vivtenigis loĝantarojn, kaj tio en diversaj kontinentoj.

Tiuj spekulaciaj operacioj ofte estas subtenataj de la oficantaj registaroj, kiuj vendas aŭ ludonas terenojn de siaj landoj.

Faraoneskaj konstruaĵoj, intensivaj kultivadoj de GMO (genetike modifita organismo) kun larĝskala uzado de pesticidoj, grandaj projektoj kun publika neutileco ... estigas labormankon, malsategon, migradon de la loĝantaro al la ladkvartaloj de la grandaj urboj, kaj favorigas nesekurecon, malsanojn, epidemiojn.

En Argentino :

Por elturniĝi el la financa krizo, kiu trafis ĝin, la landestroj kuraĝigis intensivan kultivadon de transgenaj maizo kaj sojfabo sur milionoj da hektaroj.

La respublikestrino estas la plej bona subtenantino de tiu GMO-kultivado.


Konsekvence : familioj senhavigitaj je siaj terenoj kaj je siaj loĝejoj estas malsataj ĉar sen laboro – la intensiva kultivado necesigas neniun aŭ malmultan manlaboron. Ili iras plidensigi la loĝantarojn de la ĉirkaŭurbaj ladkvartaloj. La pesticidoj kaj herbicidoj (Monsanto, per multaj aŝtubuloj en la kampoj certigas sian reklamadon) elverŝitaj per aviadiloj en la kampojn infektas la akvojn, kiujn trinkas la vilaĝanoj kaj estigas malsanojn. La loĝantaroj manifestacias kaj kelkaj vilaĝanoj instalas sin sub tendoj antaŭ la parlamento por protesti pro sia nefirmeco, sed tio estigas neniun reagon de la politikuloj.

Nikaragva lago :

La fosado de la kanalego, trairanta Nikaragvon, por duobligi tiun de Panamo, estigas gigantan laborejon, kiu pretiĝas ruinigi tiun malgrandan mezamerikan landon.

Kun du oceanoj, grandega lago, vulkanoj, vera tropika arbarego Nikaragvo estas unu el la plej fabelaj teritorioj de la planedo loĝata de indianoj, nigruloj, mestizoj.

La eksa gerilano Daniel Ortęga, diktatoro estranta ekde 2007, sola ĵus decidis vendi sian landon al Ĉinaj investantoj, kiuj devas konstrui kanalegon por ebligi la pason de kontenerŝipoj de pli ol 250 000 tunoj. Ĉinio trovas tie historian ŝancon ekpaŝi sur la amerika kontinento. La alproprigo de vastaj teritoriaj partoj fare de la Ortega klano havas kiel celon : povo kaj mono.



La kanaltrako tra la lago laŭ 105 km de longeco estigas gigantajn problemojn, ĉar la akva profundeco estas ofte malpli ol 10 metroj, dum necesas 27 ĝis 30 metroj. Necesas dragi milionojn da tunoj da sedimentoj, kio ruinigus la lagan ekosistemon, la plej granda rezervo de sensala akvo en la lando kaj en la tuta regiono inter Meksikia sudo kaj Panamo.

Dekoj da protest-manifestacioj okazis de unu jaro kaj la plej freŝdata, en lasta junio, arigis milojn da homoj.

Ĝis kiam subteno de la tuta mondo por preventi tiun katastrofon ?

En Tanzanio :

Masajoj rezistas de jardekoj kontraŭ la alproprigo de siaj tradiciaj terenoj far profitemaj investantoj, kiuj deziregas la regionan faŭnon por turismo kaj ĉasado.

La Tanzania prezidento, konfrontita al popola premo, rezignis la konfiskon de la masajaj terenoj, sed la promesoj ne estas respektitaj kaj la masajaj loĝantaroj ricevis la informon, ke ili devas forlasi sian teritorion.

En Brazilo :



Ekzemplo de baraĵo

Por kontentigi siajn energiajn bezonojn Brazilo konstruas multajn baraĵojn en la riveregoj. Vidante siajn terenojn minacataj la indiĝenaj popoloj plene mobiliziĝas kontraŭ la laborejoj. Manifestacioj arigas la ĉeriverajn komunumojn, la religiajn ĉefojn kaj ili marŝadas laŭ la ritmo de la tradiciaj kantoj kaj paroladoj, asertante, ke la diverseco de la energiaj fontoj estas ebla, kaj denuncante la intereskonfliktojn ekzistantajn por elekti baraĵojn.

La polica armeo ĉirkaŭfermas la vilaĝojn. La konstruado de la baraĵoj estas ne nur punkto de malakordo, sed ankaŭ parto de la vera konflikto : tiu de la limoj de la indiĝenaj teritorioj. Tamen, laŭ la brazila konstitucio, la « prapatraj teritorioj estas nefordoneblaj, sen iu ajn ebleco de traktado.

En Francio :

La fenomeno de la malpliigo de la agrikulturaj terenoj estas maltrankviliga realeco.

De la 60aj jaroj, la minaco pendas super la plugeblaj terenoj (kultureblaj, inkluzive de la novaloj), la paŝtejoj kaj furaĝaj herbejoj, la vitkampoj, la legomĝardenoj, averaĝe 110 000 hektaroj estas jare perditaj.

Ĉefe pro betonado malaperas la agrikulturaj terenoj. Tio havas diversajn formojn : ĉirkaŭ 70 000 hektaroj jare : industriaj kaj komercaj areoj, substrukturoj por la transporto, minejoj kaj ŝtonminejoj, rubejoj kaj konstruado de loĝejoj, ktp..

La pli ofta modelo de la individua domo, la malforto de la politikoj de protektado de la agraj areoj aŭ la kvazaŭ ekskluziva kredo en la ekonomia potencialo de la grandaj projektoj (ofte ne-utilaj) de substrukturoj estas tiom da demandoj por fari kaj debati. Artefariteco estigas ankaŭ maltrankviligajn ekologiajn konsekvencojn : disfluado de pluvakvoj, erozio, kiu estigas terŝoviĝojn, inundoj. Ĝi partoprenas en la klimata ŝanĝiĝo, fragmentas la naturajn habitatojn, la pejzaĝojn kaj afliktas la biodiversecon.

Ĉie tra la mondo homoj indignas, provas defendi la terenon por plu vivi harmonie kun sia medio protektante ĝin.



Ekzemplo de konstruado sur eksa agro

MSM kredas je interpopola solidareco ĉar : *La tero nutrus ĉiujn homojn, se ĉiu solidare agadus.*

Claudine Tournier

Fontoj : L'Âge de Faire (julio-aŭgusto 2015), Charlie-Hebdo (24/06/2015) Union Pacifiste (junio 2015), Chemins de terre (majo 2015), Arte.



Adiaŭon al la JEC ... Bonvenon al la DEC !

Eĉ se Monda Solidareco, nia bulteno, malmulte parolis pri ili, ni memoras verŝajne pri la promesoj, kiujn la mondo faris al si okaze de la transiro al la tria jarmilo. Aprobataj en 2000 de 193 ŝtatoj la **Jarmilaj Evoluigaj Celoj** (JEC) multe kontribuis al la sentivigo de la politikaj kaj ekonomiaj respondeculoj pri la devigo batali kontraŭ la ekstrema malriĉeco de la sudaj landoj, en ĉiuj ĝiaj formoj.



Novjorka sidejo de UN

La Jarmilaj Evoluigaj Celoj :

1. Forigi ekstreman malriĉecon kaj malsaton
2. Certigi unuagradan edukadon al ĉiuj
3. Promocii seksan egalecon kaj virinan aŭtonomecon
4. Redukti infanan mortecon
5. Plibonigi patrinan sanon
6. Batali kontraŭ aidsoso, malario kaj aliaj malsanoj
7. Protekti la medion
8. Starigi mondan partneradon por la evoluigo

Por Globidar, tio estis preskaŭ revo.

Tio estis en 2000, kaj la celoj devis esti atingitaj en 2015.

Tiam ni estas. Oni diras al ni ke ĝenerala plibonigo estas ne kontestebla. Tamen neniu "JEC" staras kun ĉiuj subceloj trafita. Malgraŭ la klopodoj de la statistikistoj, 870 milionoj da homoj suferas pro nesufiĉa nutrado kaj 6,8 milionoj da infanoj malpli ol 5-jaraj mortas ĉiujare. Se la loĝantaro kun alirebleco al trinkebla akvo kreskis, ne same estas por la aliro al salubriĝo.

En subsahara Afriko, duono de la loĝantaro vivas en 2015 per malpli ol 1 eŭro - malpli ol 700 AFK frankoj* tage. Kaj la sociaj neegalaj progresis interne de preskaŭ ĉiuj landoj. Adiaŭon al la JEC!

De du jaroj, la "ekspertoj" de ĉiuj landoj kaj en ĉiuj fakoj kunvenis kaj proponis al la sekretario de UNo la "**Daŭrivajn Evoluigajn Celojn**".

Tiuj "**DEC**", kiuj estos adoptitaj venontan septembron havas universalan valoron, kiu superas la nord-sudan klivadon, kun "kune akceptitaj ambicioj por komuna estonteco". Kiam la JEC, kiujn ili anstataŭis, estis "celoj por la aliaj", la DEC estas "celoj por ĉiuj", inkluzive por la nordo.

Ambicio kolosa : "ĉesigi la nememorable malnovajn plagojn, kiuj estas ekstrema malriĉeco kaj malsato, prefere ol daŭrigi difektadon de nia planedo kaj lasi netolereblajn neegalajn krei rankoron kaj semi malesperon" en la estonteco ĝis 2030, serio da 17 ĝeneralaj celoj estis difinitaj, kun 169 subceloj, kiuj ĉiuj estas elementoj de nova universala evoluigo, integrita kaj bazita sur la homaj rajtoj kaj respekta al la medio.

* : AFK franko : Franko de Afrika Financa Komunumo (franclingva mallongigo : F CFA)

Denove estas revo.



Se ili estos atingitaj, la DEC kondukos al konstruado de planedo sen malriĉeco, sen malsato nek subnutrado, sen evitebla morto de infanoj malpli ol 5-jaraj, sen aids, tuberkulozo, malario kaj aliaj neglektataj tropikaj malsanoj, sen diskriminacio pro genro aŭ aparteno. La alirebleco al trinkebla akvo estos universala kaj salubrigo vastigita, ankaŭ la alirebleco al sano, kuracado, elektro, transporto kaj loĝado estos universala. Ne plu estos infanlaboro kaj sklaveco. La plej postrestantaj landoj estos duoble pli industriaj ol nun. La neegalajoj estos mildigitaj en ĉiuj landoj. La planedaj limoj estos obeitaj, la redukto de la biologia diverseco haltigita, la dezertiĝo kaj la grunda troekspluatado ricevos taŭgajn solvojn.

Jes, sed per kiuj rimedoj ?

La ambicio estas moviga, sed ĝi havas verŝajnecon kaj efikecon nur se por ĉiu celo estas *politikoj* por atingi ĝin, *financoj* por subteni ilin kaj *indikiloj* por taksu la rezultojn. Sen tiuj tri elementoj, ne eblas paroli pri kredeblaj celoj.

Kiuj politikoj per kiuj institucioj ? La cerbumado pri la DEC ne detale konsideris "kiel" atingi la celojn.

Kiuj financoj ? La taksado de la financaj bezonoj ligitaj al la DEC atingas dekojn da miliardmilioj eŭroj. Klare estas ke la atingo de la deciditaj celoj ne povos esti financata per unika fonto. La helpo al evoluigo - eĉ kun la efektiviĝo de la internacia sindevigo, fariĝinta nur parola ekde 1970, al monkontribuo alta je 0,7 % de la Malneta Enlanda Produktado - tute ne sufiĉas por respondi al la bezonoj.



Kiuj indikiloj de rezultoj ? La celoj devas esti kvantigeblaj por mezuri la rezultojn, kio necesigas novajn statistikajn konojn, kune akceptitajn kaj unuformigitajn, kiuj postulas klopodojn de ĉiuj ŝtatoj por plibonigi siajn mezurilojn kaj adopti komunajn normojn.

La firmvoleco de la DEC estas asertita "La nunstato ne estas unu el la opcioj !" kaj Globidar kun plezuro raportos per ĉi tiu bulteno pri la transformiĝo de revo al realaĵoj.

Daniel Durand

Tiu artikolo estis redaktita subaze de analizo verkita de Pierre Jaquemot, esploristo asociita al IRIS : <http://www.iris-france.org/chercheurs/pierre-jacquemot>



La vojoj de la solidareco



Sar ... pasas tra Kenjo ...

La grupo TUMAINI, situanta norde de Kenjo en Mumias proponis kokbredan projekton.

La grupo konsistas el 20 inoj.

La grupo celas aĉeti kokinojn por vendi ovojn kaj kovigi, por vendi kokidojn. Jam ekzistas kokejo. La projekto estis pristudita dum la Federacia Administra Konsilantaro de MSM la 20an kaj 21an de junio 2015 ; ĝi estas deklarita « elektebla » kaj ricevis la numeron : 15.04.KE

... kaj tra Burkinio.

Wakogldo en Rimkiéta situas en la sektoro 14 de Vagaduguo (Burkinio). Ĝi konsistas el 7 membroj (3 inoj kaj 4 viroj).



La grupo Wakogldo — la teksilo — la teksaĵoj de la grupo

Tiu grupo estis viktimo de la katastrofaj inundoj de 2009 en Vagaduguo, iliaj domoj estis detruitaj. Wakogldo aliĝis al MSM en 2008, la prezidanto estas Gilbert Zongo, Aline Drabo estas sekretariino kaj Jean Sawadogo la kasisto. Nia korespondanto Bertrand Kissou estas membro de tiu grupo.

Mikrokredito pagita de la regiona asocio de la Mondcivitanoj en Poitou-Charentes (Francio) en aŭgusto 2011 ebligis al ili aĉeti dukadran teksilon, fadenon, tinkturon kaj ekteksadi laŭ la farscio de Aline (membrino), kiu sekvis staĝon en teks-lernejo. Ili praktikas tiun aktivecon de kvin jaroj kaj du aliaj homoj ricevis klerigon. Ĝis nun ili produktis por amikoj, najbaroj, sed ankoraŭ ne havis veran merkaton.

Wakogldo prezentis al MSM projekton de teksado kaj vendado de tradiciaj jupeoj. La financado ebligis al ili aĉeti materialon kaj la necesajn provizaĵojn por elvolvi sian aktivecon. La fabrikado de 1080 jupeoj, kiuj estos vendataj sur la loka merkato, estas planita, same kiel la formado de tri teksistoj. La profitoj ebligis pagi la dungitojn, repagi la prunton de MSM kaj konsistigi operacian kapitalon por aĉeti krudmaterialojn sekvontjare.

Pristudita dum la Administra Konsilantaro de la 20a kaj 21 a de junio 2015, tiu projekto estis voĉdone deklarita « elektebla » kaj ricevis la numeron 15.03.BF



Interna funkciado :

- ☞ **Togolando** : la misio de Symphorien Méda kaj de John Agbeli en Sokodeo estas planita por la fino de julio.
- ☞ **Kamerunio** : la asocio, kiu estis partnero de MSM por agadi kiel ties korespondanto, mem malfondiĝis. La Administra Konsilantaro notas tion.
- ☞ **La alvoko al bonvolemluloj** lanĉita en la bulteno n-ro 113 estis aŭdita de manpleno da homoj. La kontaktoj kuras, sed la esplorado estu daŭrigata.

La projektoj

Burkinio : la responsantoj de la loka asocio de MSM en la regiono de la Altaj Basenoj vizitis 8 grupojn, inter kiuj :

- Sababougouma en Bobodiulaso aĉetis la materialon planitan en la solidareca kontrakto ;
- Miriyagnouman en Yeguéred redaktis sian evoluoprojekton. La A.K. atendas la dokumenton ;
- Financado de iliaj projektoj estas ĵus sendita al la grupoj Toyow kaj Yancadi en Padema ;
- La muelilo de Sinignanssigui en Dodugu funkcias, sed kun oftaj paneoj ;
- En la areo de Vagaduguo, la grupo Relwende en Ziro repagis la duan parton de la prunto, kiu estis donita al ĝi en 2011 ;

En Rimkieta, la grupo Wakogldo (vorto, kiu signifas « helpo ») aliĝis al MSM en 2011. Tiu grupo projektas teksti kaj vendi tradiciajn vestojn. Tiu projekto, kiu valorigas la lokan produktadon de kotono estis deklarita « elektelebla », kaj ricevis la numeron 15.03.BF

Ankaŭ en Benino

La Pluzorga kaj Kunordiga Buroo vizitis la grupojn tra la regiono :

- la fiŝbarko de la grupo Sodjinemawu suferis kelkajn averiojn. Ĝi estas riparita kaj la fiŝsezono estis kontentiga.
- La ina grupo « La Kvin Fingroj » esperas saldi sian pruntoprenon en januaro 2016.
- La prezidanto de la grupo Mahulakpo forpasis post longa malsano. La agrikultura sezono suferis tion kaj la grupo anoncas malfuiĝon en la repag-kalendaro.

El Kongio, oriente, ni ricevis kelkajn informojn pri la malfacila situacio de la asocio « Solidareco Bona Volo », situanta en Goma (Nord-Kivuto). Ni reparolos pri ĝi.

En Kenjo, la kokbreda projekto de la grupo Tumaini estis deklarita « elektelebla ». Tiu projekto ricevis la numeron 15.04.KE

En Togolando, 4 grupoj ricevis la financadon de sia projekto : ili estas « FIDES », « Novilonlon », « Djifa », kaj Amenouveve.

Informado – Animadoj

www.globidar.org : la nova retejo estas strukturita sed la enhavo tro malplena por esti disponigita al la publiko (vidu la sekvan paĝon : alvoko al bonvolemluloj).

Pluraj prezentadoj de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato estas planitaj dum la venontaj monatoj : en Lillo, Gramat, Grezijono, Mulhuzo.

志願者需要 **Volontuloj bezonataj** VOLONTARI NECESSARI
 자원 봉사자 필요 **Bénévoles recherchés** vapaachtoisia hirvita
 Εθελοντών που απαιτούνται **Volunteers needed** volontarij bezonataj
 необходимо добровольцев **Se necesitan volontuloj** مطوعين مطلوبين
 Freiwillige benötigt **ボランティア必要** वैयसवा आवश्यक
 frivillige trengs **gönüllüler**

(daŭrigo)

Sekve de nia alvoko lanĉita en la antaŭa numero de Monda Solidareco (n-ro 113) ni estis feliĉaj ricevi respondojn de kelkaj Globidaranoj.

luj proponis al ni :

- helpi nin, kiam ni deĵoros ĉe prezentotablo proksima al iliaj hejmoj ;
- doni laŭokazan helpon ;
- traduki niajn tekstojn en Esperanton.



Al ĉiuj ni dankegas ! Ilia helpo estos valora, kaj ni ne forgesos peti ilin laŭ la momento.

Tamen estas bezonataj ankaŭ pli fakaj bonvolemuloj :

- ☞ personoj por helpi niajn administrantojn responsantajn pri projektoj kaj kiuj povus helpi ilin interalie por la korespondado kaj la pluzorgado de la grupoj (franca aŭ angla lingvoj)
- ☞ personoj kapablaj resumi niajn projektajn slipojn por enretigo en Interreton.
- ☞ persono por asisti nian kasiston.

Se vi havas monate iom da tempo por dediĉi al unu el tiuj fakoj (tio ne necesigas vojaĝon, nur konektadon al Interreto), ni estus kontentaj ekhavi vian helpon.

Esti volontulo ĉe MSM signifas esti koncernata kaj deziri vere partopreni en la vivo de asocio kiu provas certigi la prinutran memsufiĉon de niaj bezonhavaj membroj.

monda solidareco estas bulteno eldonata de **Monda Solidareco kontraŭ la Malsato**

JE VIA DISPONO :

- Aliĝiloj
 - Flugfolioj pri projektoj
 - Pliajn bultenojn
 - Federacia Reglmento de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato
 - Afiŝetoj (A3-formato)
- Bonvenas partopreno en la sendokosto (3 € aŭ pli)*

Nur por Eŭropo :

- Blankaj ĉemizetoj : 20 € - trikoĉemizoj 15 € kun la emblemato « *Fonds Mondial* ».
- Kovertoj DL (11 cm x 22 cm) « *Solidarité Mondiale contre la Faim* » + emblemato : 6 € por 100 + sendokosto : 3 €
- Fotoj paperaj aŭ elektronikaj.

Se vi konstatas malfruigon en la liverado (aŭ forgeson !) vi bonvolu fari al ni amikan realvokon ! Antaŭdanke.

**KOTIZOJ - DONACOJ - ABONOJ - MENDOJ :
Kiel pagi ?**

- ☞ per franca ĉeko al **Globidar**
- ☞ per poŝtaj rimedoj, je la nomo de : **SMF- MONDA SOLIDARECO** (PĈK-CCP PARIS 10.734.96 Z) RIP: **FR21 2004 1000 0110 7349 6Z02 056**
- ☞ per banka karto aŭ **PayPal** tra la retejo www.globidar.org
- ☞ ankaŭ per monbiletoj enŝovitaj en ordinaran koverton.
- ☞ UEA kontoj : **mfsk-g**

Librotenado je la sama adreso kiel la bulteno

Sur la adresetikedo de la koverto aperas la proksimuma dato de via lasta financa partopreno. Vi bonvolu kontroli ĝin !

RICEVITAJ KOTIZOJ kaj DONACOJ

Aprilo 2015	1902 €
Majo 2015	1098 €
Junio 2015	1584 €
Julio 2015	1163 €

MONDA SOLIDARECO estas eldonita en Esperanto, kaj franca lingvo.

Jara abono : 5 €

Redakcia komitato : Alain Bal, Danièle Charier, Daniel et Odile Durand, Hotto Abdoulaye,
Fotoj el la fototeko de MSM
Emblemo : Yamsina Sahraoui
 Elfrancisgis Daniel Durand, Christian Bertin
 Kontrolis (ne)

Directeur de la publication : Daniel Durand
 CPPAP n° 0410 G 86482.
 Imprimerie de l'association.
 Tel : +33 (0)241 78 47 75
info@globidar.org
www.globidar.org

MONDA SOLIDARECO

Les Nids
FR 49190 St-AUBIN-DE-LUIGNE
 Francio